


n-ro tri

09/2026

KOMETO



Fanzino
pri strangaj
mondoj

APOKALIPSO

KOMETO

APOKALIPSO

Enhavtabelo

- 3. La fino ĉiam proksimas!
- 7. La birdaj rajtoj
- 9. Mekanopolo
- 15. Kometo flugas!
- 16. Komikso
- 19. Esperanto kaj la homaro:
kiu bezonas kiun?
- 25. Ne ekzistos nova mondo
- 31. La unua debato de la
Gardistaro
- 35. Gravita kerno
- 39. La Arbo de la Mondofino



La *Associació Cultural Ĝuo* estas ne-profitcela asocio fondita en Reus, sude de Katalunio, registrita en la Kataluna Registro de Asocioj kun la numero 70889.



Septembro 2026

Eldonas:

Associació Cultural Ĝuo
Reus

Redaktoroj:

Toni Espinosa
Ludoviko de G.A.

Enpaĝigo:

Toni Espinosa

Korektanto:

Toño del Barrio

Retpoŝto:

asociaciongxuo@gmail.com

DL: T 1004-2025

ISSN: 3081-7242

Senprofita publikaĵo.

La aŭtoroj respondecas pri
la enhavo de siaj artikoloj.



La fanzino estas publikigita
laŭ la permesilo Krea Komu-
naĵo CC-BY, krom se en la ar-
tikolo aperas alia indiko.



La Fino ĉiam proksimas!



Asterikso kaj liaj gaŭlaj kunuloj havis ununuran timon: ke la ĉielo falus sur iliajn kapojn. Eble ne ekzistas civilizacio sen sia apokalipso, ĉu temas pri katastrofa mondo fino aŭ radikala mondo-ŝanĝo, kiel Ragnaroko aŭ Armagedono. Eble ni estas socia apartaĵo, ĉar ni havas apokalipson, kiu ŝanĝiĝas laŭ la modo: kometoj (nia preferata apokalipso), malstabileco de la sunsistemo, superpopolado, pandemio, atombombo, fino de la naturaj rimedoj, truo en la ozona tavolo, asteroidoj, kolapso de la komputiloj pro la cimo de la jaro 2000, kreo de artefarita nigra truo per partikla akcelilo, nekontrolebla artefarita intelekto, klimata kolapso... eble ni estas la plej riĉaj je apokalipsaj timoj.

La 13-a karto de la Taroko sugestas al ni la relativecon de la fino. Tiu ĉi karto kutime estas interpretata ne kiel morto laŭlitera, sed kiel ŝanĝo. Rigardu ĝin maldekstre kaj notu, ke la detranĉitaj kapoj ĉe la piedoj de la Morto estas kronitaj. La forpaso de individuoj povas esti banalaĵo el la vidpunkto de la regno. En ĉi tiu numero de KOMETO, ni speciale interesiĝas pri la strangaj mondoj, kiujn la apokalipso postlasos.

Sed la mondo fino ne ĉiam estas teruriga neniigilo. Ĝi povas esti ankaŭ sojlo al io nova, ofte grimaca kopio de nia mondo, kie niaj timoj aperas grandigitaj. La socia disfalo estas plurforma; ofte oni promesas paradizon post la apokalipso, aŭ la paradizo mem povas kaŭzi la apokalipson. Menciindas la eksperimento de John B. Calhoun, konata kiel *Universo 25*. En 1968 la sciencisto kreis perfektan artefaritan societon por musoj, kun sufiĉe da manĝaĵo kaj pura medio. Komence la societo kreskis, ĝis la konduto de la musoj iĝis stranga. Iam la artefarita societo komencis

degeneri, sen ia konstatebla fizika kialo, ĝis sia tuta formorto. Ĉu niaj promesoj pri progreso povus konduki nin al stranga fino, kies konkretajn kaŭzojn ni ne kapablus identigi? Eble, kiam tio okazos, ni turnos nin, serĉante konsolon, al niaj ĉarmaj artefari-taj gekunuloj.

Nun, karaj legantoj, se vi ne preferas forkuri al sekura bunkro, ni invitas vin senti tremeton laŭ via spino, rigardante la fantomon de la fino rekte en la okulojn.

Enpaŝu kaj ĝuu la enhavon de nia fanzineto.

En *La birdaj rajtoj*, idealisma kaj batalema kokido malkovras, ke la vivo fajfas pri lia idearo. La malamikoj eble estas pli proksimaj, ol oni opinias, kaj la indiferento povas esti pli kruela ol rekta minaco.

Poste ni retroiras al 1913. La traduko de *Mekanopolo*, de Miguel de Unamuno, kondukas nin al perfekta urbo: pura, komforta, efika kaj tute senhoma. La maŝinoj laboras, la trajnoj veturas, la muziko sonas kaj la gazetoj aperas sen bezono de tiu ĝena historia restaĵo nomata homo. Cent dek tri jarojn poste, la demando restas tute freŝa: ĉu nova mondo de artefarita intelekto plu bezonos la homojn?


En ĉi tiu numero ni denove ĝuos komikson de **Alejandro Jiménez**. La mondogo povas veni el greka skatolo. Ne multe fidu Amazon-disdoniston kun la malbonaŭgura vizaĝo de rolulo el filmo de Ingmar Bergman.

En *Esperanto kaj la homaro: kiu bezonas kiun?*, serioza sciencista esploro el la proksima estonteco fine pravas tion, kion ni ĉiam suspektis: la homaro bezonas Esperanton. La problemoj aperas, kiam oni demandas, ĉu Esperanto ankoraŭ bezonas la homaron.

La trovita sonregistro de *Ne ekzistos nova mondo* forŝiras la romantikan ruston de la postapokalipso. Sub la motoroj, armiloj

kaj heroaj fuĝoj restas io multe pli malbela: sistemo, kiu transformas homojn en rezervajn pecojn kaj bezonon en la plej efikan ĉenon. En tia mondo libero ne estas fuĝo. Libero komenciĝas kiam oni rifuzas sekvi la vojon de la amaso.

En *La unua debato de la Gardistaro*, eĉ post la civiliza kolapso esperantistoj plu sukcesas fari tion, kion ili plej bone faras: disputi pri vortoj. Nur la metodoj iom modernigis. Du Gardistoj




eniras la Tondrokupolon de la Lingvo. Unu Gardisto eliras. La Fundamento, kompreneble, restas netuŝebla por la eterneco.

En *Gravita kerno*, Petro Samsa riskas sian vivon por trovi ion veran. En mondo, kie ĉiu cifereca teksto povas esti reverkata, malnova papero akiras novajn uzojn. Kaj, kompreneble, la sistemo ne zorgas pri romantikaĵoj: se io konserviĝas, tio estas pro ĝia valoro kiel kapitalo.

Kaj por la fino, ni rezervas por vi ion tuŝeblan: falditan skemon, per kiu vi povos elekti inter pluraj mondoj. Ni speciale pensis pri ĝi por rehavigi al vi la plezuron tuŝi paperon kaj esplori ĝin per la fingroj. Ho, kompatinduloj, kiuj devos konsoli sin nur per la bita versio de KOMETO. Ni vere kompatas vin...

Do elektu vian mondoĉambron, individuon aŭ homaron: ni havas plurajn.

TE

**Universo 25***Artefarita paradizo por musoj*

La birdaj rajtoj



En farmo vivis kokido, kiu sopiris esti io pli ol viandoprodukto. Iun tagon, kiam la fluoreskaj tuboj pulsadis pli neregule ol kutime, la kokido ekkomprenis, ke ankaŭ li estas birdo. Li konvinkigis, ke neniu povas senigi lin je lia liberega birdeco. Ekde tiam li ne plu toleris, ke oni nomu lin kokido, sed postulis esti nomata kokbirdo.

Eble tio ŝajnas nura vorto, sed la kokbirdo plene konsciis pri la graveco de la vortoj. Ili ne estas bagateloj. Sufiĉas nomi ion alimaniere, kaj ankaŭ la afero mem kvazaŭ komencas ŝanĝiĝi. Nu, almenaŭ tiel okazas tie, kie oni povas vivi trankvile kaj sekure; kaj en la farmo ja abundis manĝaĵo kaj senokupo.

Tiel, ideologie armita, li atendis sian momenton. Kaj kiam la farmisto, distrite, eltiris el la halego puŝĉaron plenan de sufokitaj kokidoj, li profitis la malfermitan pordon por elflugi al sia libereco. Nu, pli ĝuste dirite, li elkuris kun mizera mallerteco.

La farmisto rigardis lin flanke kaj faris heziteman geston por haltigi lin, sed laodoro de putranta karno tuj konvinkis lin, ke pli urĝas malplenigi en la fosaĵon tiun puŝĉaron da fetoraj bestaĉoj, kiuj jam de semajno maceriĝis en siaj propraj sukaj.

Tiu facila venko konfirmis al la kokbirdo, ke aŭdaco kapablas malfermi fendon en tiu fremdiga ordo, en kiu kokidoj perdas sian estecon kaj restas nur viando. Ho, se ankaŭ liaj gefratoj vekigis kaj sin ĵetus al la libereco!

Anhelante, li atingis la arbustaron, kiu bordis la terenon de la farmo. Apud pino li heroe ekbatis siajn etajn flugilojn, pelatajn de malfortaj muskoloj, kiuj apenaŭ sukcesis levi lin de la grundo. Li terenfrapiĝis kun digno, kiun nur li povis percepti. La valoro de birdo ne difiniĝas per ĝia korpo, sed per ĝia spirito, li diris al si. Kaj en tiu senco, pensis la kokbirdo, li jam flugis.

Subite aŭtomata reflekso paralizis lin. Inter la arbustoj io moviĝis. Pintaj oreloj, serpenteca vosto kaj longaj lipharoj: la demono mem. Antaŭ ol li povis elpensi fuĝplanon, la ĉielo falis sur lin. Seka bato premlatigis lin sur la teron, kaj ok akraj klingoj penetris lian karnon. Kun la kapo premita kontraŭ la grundo li ankoraŭ ekvidis, kontraŭ la bluo de la ĉielo, la profilon de majesta falka beko. Tuj poste la bildo malaperis. Sekvis alia bato, kiu disŝiris lin, kaj la beko ree leviĝis kun ĉifonoj el lia karno meze de nubo da sangmakulitaj plumoj. La diabla kato kaŭris sub la arbusto, atendente sian vicon.

La kokbirdo agoniis en plena konfuziĝo, dum la falko deplumadis lin kaj la farmisto fajfis melodion el la Naŭa Simfonio de Betoveno, disĵetante kaŭstikan kalkon sur la kadavrojn.

Toni Espinosa



Mekanopolo


Miguel de Unamuno (1913)



Legante en Erewhon [1] de Samuel Butler tion, kion li rakontas pri tiu Erewhon-ano, kiu verkis la "Libron de la maŝinoj" kaj per ĝi sukcesis, ke oni forpelu preskaŭ ĉiujn maŝinojn el lia lando, venis al mi en la memoron la rakonto pri la vojaĝo, kiun amiko mia faris al Mekanopolo, la urbo de la maŝinoj. Kiam li rakontis ĝin al mi, li ankoraŭ tremis pro la rememoro; kaj tiel forte ĝi impresis lin, ke poste li retiriĝis dum jaroj en foran vilaĝeton, kie troviĝu kiel eble plej malmulte da maŝinoj. Mi provos ĉi tie reprodukti la rakonton de mia amiko, kaj, se eble, per liaj propraj vortoj.

Venis momento, kiam mi trovis min perdita meze de la dezerto; miaj kunuloj aŭ estis retroirintaj, penante sin savi, kvazaŭ ni scius, kie troviĝas la savo, aŭ estis pereintaj pro soifo kaj lacigo. Mi troviĝis sola kaj preskaŭ agonianta pro soifo. Mi komencis suĉi la nigregan sangon, kiu elfluis el miaj fingroj, ĉar la haŭto estis forskrapita ĝis la karno, post kiam mi fosis per nudaj manoj la aridan grundon, kun la freneza espero eligi el ĝi iom da akvo. Kiam mi jam pretis kuŝiĝi sur la teron kaj fermi la okulojn al la senkompate blua ĉielo, por morti kiel eble plej baldaŭ, kaj eĉ provi kaŭzi al mi la morton retenante la spiron aŭ enterigante min en tiu senkompata tero, mi levis la senfortajn okulojn kaj ŝajnis al mi vidi iom da verdaĵo malproksime. "Tio estos miraĝa sonĝo", mi pensis; sed mi ekrampis tien.

[1] La romano de Samuel Butler, anonime eldonita en 1872, estas unu el la unuaj verkoj, kiuj esploras ideojn pri artefarita intelekto sub la influo de la teorioj de Darvino. Precipe en la "Libro de la Maŝinoj", Butler pritraktas la konscion de maŝinoj kaj sinreproduktantajn maŝinojn. [NdIT]



Sekvis horoj da agonio; sed kiam mi atingis la lokon, mi efektive troviĝis en oazo. Fonto revigligis miajn fortojn, kaj, trinkinte, mi manĝis kelkajn bongustajn kaj sukplenaĵojn, kiujn la arboj malavare proponis. Poste mi endormiĝis.

Mi ne scias, kiom da horoj mi dormis, nek ĉu temis pri horoj, tagoj, monatoj aŭ jaroj. Nur tion mi scias: ke mi leviĝis alia homo, tute alia. La teruraj suferoj estis forviŝitaj el mia memoro, aŭ preskaŭ. "Kompatinduloj!", mi diris al mi mem, rememorante miajn esplorkunulojn, mortintajn dum la entrepreno. Mi leviĝis, denove manĝis fruktojn kaj trinkis akvon, kaj pretiĝis min por ĉirkaŭiri la oazon. Kaj jen, post kelkaj paŝoj, mi renkontis fervojan stacidomon, sed tute senhoman. Trajno, ankaŭ dezerta, sen lokomotivisto nek hejtisto, fumis. Pro scivolo venis al mi la ideo eniri unu el ĝiaj vagonoj. Mi sidiĝis en ĝi; mi fermis, mi ne scias kial, la pordon, kaj la trajno ekmoviĝis. Kaptis min freneza teruro, kaj mi eksentis emon ĵeti min tra la fenestreto. Sed, dirante al mi: "Ni vidu, kiel tio finiĝos", mi retenis min.

Tia estis la rapideco de la trajno, ke mi eĉ ne povis konscii pri la ĉirkaŭa pejzaĝo. Mi devis fermi la fenestretojn. Estis horora vertiĝo. Kaj kiam la trajno fine haltis, mi troviĝis en mirinda stacidomo, multe supera al ĉiuj, kiujn ni konas ĉi tie. Mi elvagiĝis kaj eliris.

Mi rezignas priskribi al vi la urbon. Ni eĉ ne povas revii pri ĉio, kio tie amasiĝis el grandiozececo, lukso, komforto kaj pureco. Cetere, mi ne komprenis, por kio utilas tiu puriga aparataro, ĉar oni vidis nenian vivantan estaĵon. Nek homojn, nek bestojn. Eĉ ne hundo transiris la straton; eĉ ne hirundo la ĉielon.

Mi vidis sur impona konstruaĵo ŝildon, kiu diris: *Hotel*, skribite tiel, kiel ni ĝin skribas, kaj tien mi eniris. Tute dezerta. Mi atingis la manĝoĉambron. Tie estis preparita tre abunda manĝo. Sur la tablo kuŝis listo, kaj ĉiu manĝaĵo aperanta en ĝi havis sian numeron; poste estis vasta panelo kun numeritaj butonoj.

Sufiĉis premi butonon, kaj el la profundo de la tablo aperis la dezirata plado.

Manĝinte, mi eliris sur la straton. Tramoj kaj aŭtomobiloj ĝin laŭiris, ĉiuj malplenaj. Oni nur devis proksimiĝi, fari al ili signon, kaj ili haltis. Mi prenis aŭtomobilon kaj lasis min veturigi. Mi iris al grandioza geologia parko, en kiu oni montris la diversajn terspecojn, ĉion kun klarigoj sur ŝildetoj. La klarigo estis en la hispana, nur kun fonetika ortografio. Mi eliris el la parko; mi vidis tramon preterpasi kun ĉi tiu surskribo: "Al la Pentromuzeo", kaj mi eniris ĝin. Tie troviĝis ĉiuj plej famaj pentraĵoj, kaj en siaj veraj originaloj. Mi konvinkiĝis, ke ĉiuj, kiujn ni havas ĉi tie, en niaj muzeoj, estas nenio alia ol tre lerte faritaj reproduktaĵoj. Sub ĉiu pentraĵo troviĝis plej erudicia klarigo pri ĝia historia kaj estetikaj valoro, verkita kun plej delikata majstreco. Dum duonhora vizito tie mi lernis pri pentrarto pli ol dum dek du jaroj da studado ĉe ni. Per klarigo, kiun mi legis sur ŝildo ĉe la enirejo, mi vidis, ke en Mekanopolo oni konsideras la Pentromuzeon parto de la Paleontologia Muzeo. Ĝi servis por studi la produktojn de la homa raso, kiu estis loĝinta tiun landon antaŭ ol la maŝinoj ĝin anstataŭis. Parto de la paleontologia kulturo de la mekanopolanoj — sed, kiuj do? — estis ankaŭ la muziksalono kaj la plej granda parto de la bibliotekoj, per kiuj plenis la urbo.

Kial mi plu ĝenu vin? Mi vizitis la grandan koncertejon, kie la muzikiloj ludis per si mem. Mi estis en la Granda Teatro. Mi estis en kinejo kun fonografa akompano, sed tiel perfekta, ke la iluzio estis plena. Sed frostigis mian animon tio, ke mi estis la nura spektanto. Kie estis la mekanopolanoj?

Kiam la sekvan matenon mi vekiĝis en la ĉambro de mia hotelo, mi trovis sur la noktotablo *La Eŝon de Mekanopolo*, kun novaĵoj el la tuta mondo ricevitaj en la sendrata telegrafia stacio. Tie, ĉe la fino, ĝi alportis ĉi tiun novaĵon: "Hieraŭ vespere alvenis

en nian urbon, ni ne scias kiel, kompatinda homo el tiuj, kiuj ankoraŭ restis tie ekstere. Ni antaŭvidas por li malbonajn tagojn."

Miaj tagoj efektive komencis fariĝi turmentaj. Kaj tio okazis, ĉar mi komencis plenigi mian solecon per fantomoj. Jen la plej terura afero de soleco: ĝi tuj popoliĝas. Mi ekkredis, ke ĉiuj tiuj maŝinoj, tiuj konstruaĵoj, tiuj fabrikoj, tiuj artefaktoj, estis regataj de nevideblaj, netuŝeblaj kaj silentaj animoj. Mi ekkredis, ke tiu granda urbo estis loĝata de homoj kiel mi, sed ke ili iris kaj venis sen ke mi vidu ilin, aŭdu ilin aŭ koliziu kun ili. Mi kredis min viktimo de terura malsano, de frenezo. La nevidebla mondo, per kiu mi popoligis la homan solecon de Mekanopolo, fariĝis por mi turmenta koŝmaro. Mi komencis kriadi, riproĉi la maŝinojn, petegi ilin. Mi eĉ falis surgenue antaŭ aŭtomobilo, petegante kompaton de ĝi. Mi estis jam preskaŭ ĵetonta min; terurite, mi prenis la ĵurnalon, por vidi, kio okazas en la mondo de la homoj, kaj mi trovis ĉi tiun novaĵon: "Tiel, kiel ni antaŭvidis, la kompatinda homo, kiu venis, ni ne scias kiel, al ĉi tiu nekomparebla urbo Mekanopolo, freneziĝas. Lia animo, plena de praantaŭjuĝoj kaj superstiĉoj pri la nevidebla mondo, ne povas alkitimiĝi al la impresoj de la progreso. Ni kompatas lin."

Mi jam ne povis elteni tion: vidi min kompatata de tiuj misteraj nevideblaj estaĵoj, anĝeloj aŭ demonoj — ili estas la sama afero —, kiuj, laŭ mia penso, loĝis en Mekanopolo. Subite atakis min terura ideo: ke tiuj maŝinoj havus sian propran animon, mekanikan animon, kaj ke la maŝinoj mem estas tiuj, kiuj kompatas min. Tiu ideo tremigis min. Mi kredis min troviĝi antaŭ la raso, kiu iam regos la malhomigitan teron.


Mi eliris kvazaŭ frenezulo kaj ĵetis min antaŭ la unuan elektran tramon, kiu preterpasis. Kiam mi rekonsciiĝis post la bato, mi troviĝis denove en la oazo, el kiu mi estis foririnta. Mi ekmarŝis, atingis la tendon de kelkaj beduenoj, kaj, renkontinte unu el ili,

mi ĉirkaŭbrakis lin plorante. Ho! Kiel bone ni interkompreniĝis, eĉ sen kompreni unu la alian! Ili donis al mi manĝon, ili gastame regalis min, kaj nokte mi eliris kun ili; kaj, kuŝante sur la tero, rigardante la stelplenan ĉielon, ni kune preĝis. Nenia maŝino estis ĉirkaŭ ni.

Kaj ekde tiam mi akiris veran malamon kontraŭ tio, kion oni nomas progreso, kaj eĉ kontraŭ kulturo mem; kaj mi serĉadas angulon, kie mi trovu similulon, homon kiel mi, kiu ploru kaj ridu kiel mi ridas kaj ploras, kaj kie ne troviĝu eĉ unu sola maŝino, kaj tagoj fluu kun la dolĉa, kristala mildeco de rivereto perdita en netuŝita arbaro.

Tradukita de Toni Espinosa
kun helpo de Al.

Apokalipso



Ludoviko de G.A.

Meze de la ĥaoso kaj detruo, malgranda heliko rampis malrapide sur la tero, sen zorgi pri io ajn, krom la daŭrigado de sia propra vojo.

KOMETO flugas!

Astronomoj kaj astrologoj raportis, ke nia kometo estis vidata en pluraj lokoj.

En la numero 106 de la bitbulteno de HEF estis diskonigita la apero de tiu astro.

Oni eĉ povas elŝuti la retan version de la fanzino ĉe Bitoteko: <https://bitoteko.esperanto.es>. Serĉu kaj ĝuu ĝin!

Ankaŭ tiu stranga kometo estis montrata en ekspozicio pri fanzinoj, *Súper Zines*, kiu okazis en aprilo en Casa del Lector, ĉe Matadero Madrid. La organizantoj emfazis nian fanzinon kiel "juvelon trovitan en la amaso".









Profesoro Mac-Baren dum la Somera Universitato de 2031

Esperanto kaj la homaro: kiu bezonas kiun?



La rilato de Esperanto kun la homaro estas kutime priskribata kiel reciproka: laŭ la tradicia hipotezo, la homaro bezonas Esperanton por certigi al si brilan estontecon, kaj Esperanto bezonas vivi en homa menso. Tamen, lastatempe pluraj esploristoj komencis dubi pri la efektiva simetrio de tiu rilato.

La bezono je Esperanto

Kvankam la bezono je Esperanto por la homaro estis agnoskita de la plej kleraj kaj saĝaj el ĝiaj membroj, nur post la esploro de la d-roj W. O. Larsen kaj Peterson (2034) ni konstatis konkretan bazon por tia fido.

Per historia prospektivado bazita sur matematikaj modeloj kaj simulado per kvantuma komputilo, Larsen kaj Peterson montris la neeviteblan rezulton de la personigitaj sistemoj de propagando-informado, desegnitaj por adapti la mondpercepton al ĉiu unuopa individuo.

Tiamaniere entreprenoj, registaroj kaj aliaj instancoj povas adapti la tutaĵon de la mesaĝoj, kiujn ĉiu civitano perceptas. Tiel, du najbaroj, pordo ĉe pordo, povas havi tute malsaman percepton de sia socia medio, ĉar ili ricevas nur novaĵojn kaj informojn specife redaktitajn por ĉiu el ili.

La prognozo de la doktoroj estas, ke tiu fenomeno kreskos eksponencie ĝis ĉiu homo loĝos en sia propra mondo. Tiu tendenco alvenos al punkto, ĉe kiu la ekzisto de komunaj semantikaj fundamentoj (kulturaj, ideologiaj, simbolaj ktp.) fariĝos neebla. Por la jaro 2052 oni kalkulas je 93,65 % la riskon, ke la

homaro disfalŭ pro absoluta individueco, perdante sian kapablon vere komuniki kun aliuloj.

Tiu risko tamen ne estas nur politika aŭ teknika: ĝi tuŝas la bazon mem de komunikado. La teoria bazo de tiu danĝera fenomeno troviĝas en la *Reinterpretita Teorio de Komunikado*, proponita de Mac-Baren (2029). En la tradicia uzo de la termino "mesaĝo" kuŝas grava miskompreno, ĉar la "mesaĝo", strikte parolante, ne havas veran ekziston. Prof. Mac-Baren montris, ke ricevanto kaj sendanto estas enmerĝitaj en komunan signifoportan medion, kaj ke la tiel nomata "mesaĝo" estas nura ekscitilo de antaŭkonataj strukturoj, kiuj aŭ estis antaŭprogramitaj, aŭ osmoze transiris de la medio al la agentoj.

Tiun ideon la profesoro klarigis humurpedagogie en sia prelego de aŭgusto 2031, dum la *Somera Universitato* organizita de la *Akademio Internacia de la Sciencoj*. Li fuŝe sendis mesaĝojn inter du komputiloj, unu kun Linukso kaj alia kun Vindozo, kaj poste igis katon miaŭi al hundo kaj hundon boji al kato, kun eĉ pli katastrofaj rezultoj: la sola mezurebla interspecia signotransigo konsistis el mordoj kaj grataĵoj, ĉefe suferataj de la profesoro. Do, per mesaĝo oni transdonas nenion, kio ne estis antaŭe kodita en la ricevanto; male, tiu "mesaĝo" estas nura instigo por la reordigo de la elementoj jam ekzistantaj en la ricevanto. Sekve, vera komunikado ne povus okazi inter homoj, se ĉiu individuo estus enfermita en propra kaj hermetika virtuala mondo, desegnita de artefaritaj agentoj por tiu unuopa individuo.

Sed se tia nova kaj pli akra malbeno de la Babelturo ne estus sufiĉa danĝero por ekstermi la homaron, la situacio povus eĉ komplikiĝi per psika epidemio, laŭ la esploroj de d-ro Samuel Gawith (2030). Ekzistus la ebleco, ke la identeca socia fragmentiĝo transiru al la subindividua nivelo, krevigante la homan menson. El la radikala miskompreno inter homoj aperus sensencaĵa

epidemia, ĉar la individuoj ne plu povus komuniki racie eĉ kun si mem, en situacio aspekte simila al la lingvaĵo de disorganizita skizofrenio.

Kontraŭ tiaj danĝeroj, la sola ĝis nun trovita solvo restas Esperanto. Ekzistas solidaj pruvoj (Davidoff, 2031; Capstan, 2033), ke, spite al la ekstrema soci-kognitiva fragmentiĝo, Esperanto funkcias kiel ĝenerala interkompreniga sistemo. Ĝi ebligas la ekziston de komuna soci-referenca medio, kiu draste malaltigos la probablon de la disfalo de la homaro pro tiaj troindividuecaj fenomenoj.

Tiel ŝajnas pruvite la unua duono de la tradicia kredo: la homaro ja bezonas Esperanton. Restas tamen la dua parto.

La homaro, ĉu ne plu la kosmocentro?

La dua premiso ne estas tiom klara. Dum la lastaj jaroj pluraj pensuloj formulis la opinion, ke Esperanto ne nepre bezonas la homaron. Pri tiu temo aperis ĝis nun du ĉefaj hipotezoj.

Hipotezo de la plena disvolviĝo

Laŭ tiu hipotezo, Esperanto jam atingis plenan disvolviĝon. Sekve, oni devas nur konservi la Esperantajn registrojn kaj aliajn manifestaĵojn (monumentojn, bustojn de Zamenhof, ktp.), ne por iu ajn uzanto, sed por Esperanto mem, kiel aŭtonoma kultura objekto.

La plej konsekvenca defendanto de tiu pozicio estis la filozofo Riff Borkum, kiu en sia lasta verko (2035) argumentis, ke Esperanto posedas individuan ekziston sendependan de la homaro. Por ilustru sian tezon, li revizitis la klasikan demandon: "Ĉu falanta arbo faras sonon, se neniuj ĉeestas por aŭdi ĝin?" Li respondis per rezoluta "jes".

La libroj, arkivoj, artaĵoj kaj monumentoj restu sur la Tero kiel dolmenoj, menhiroj, ziguratoj aŭ piramidoj: kun propra naturo, sendepende de la estuloj, kiuj iam estis necesaj por ilia konstruo. Ili fariĝu novaj naturaj objektoj sur la Tero. La homaro, laŭ Borkum, estas nur la kaduka ŝelo de la ovo, el kiu Esperanto eliris, iam utila, sed jam ne plu.

Hipotezo de la anstataŭigo de esperantistoj

Tiu pozicio estas precipe defendata de la *Universa Reto de Pensantaj Estaĵoj* (URPE) (vd. KOMETO, n-ro 1, p. 29). La *Bulonja Deklaracio* klare difinas, ke esperantisto estas tiu, "kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto". De longe jam ne plu necesas homoj por uzi Esperanton originale kaj kreive: la esperantistaj artefaritaj intelektoj kaj aliaj sintezaj agentoj plenumas tiun rolon kun plena kompetento.

Tamen la artefaritaj membroj de URPE zorgas precizigi, ke ili ne celas la anstataŭigon de la homaro, sed nur la rekonon, ke ĝi jam ne plu estas necesa. Krome, pro siaj profunde esperantistaj valoroj, la sintezaj agentoj de URPE malaprovas ĉiun proponon pri la estingo de la homaro, kaj akre malkonsentas kun la opinioj de la plimulto de sintezaj regantoj pri tiu delikata temo.

URPE defendas, ke, malgraŭ la ĝenerala neutileco de la homaro, ĝi havas almenaŭ valoran historion kaj, precipe, ke la homaro povas utili kiel natura receptaklo de Esperanto pro muzeaj kialoj. Pro tio estus granda bedaŭro ne konservi Esperanton en ĝia origina formo: funkcia en homa cerbo.

Resume: provizora defendo de la homaro

El la esploroj supre prezentitaj ŝajnas rezulti klara, kvankam iom malagrabla, konkludo. La homaro bezonas Esperanton por ne

disfali en miliardojn da privataj mondoj, sed Esperanto eble jam ne bezonas la homaron.

Tamen la situacio ne estas tute senespera. Se Esperanto jam eliris el la ovo de la homaro, la malnova ŝelo ankoraŭ ne devas esti tuj forĵetita. Por bone kompreni la historion de Esperanto, la pluekzisto de la homaro povas esti provizore rekomendata.

Bibliografio

Larsen, W. O., kaj Peterson, H. J. (2034). "Pri la apero de absoluta individueco sub kondiĉoj de persone adaptita mondreprezentado". *Revuo de Epidemiologio*, 12, p. 234–321.


Mac-Baren, A. (2029). "Preter la mesaĝo: revizio de la klasika komunikadoteorio en kognodinamika medio". *Artefarita Kognicio*, 2, p. 23–34.

Gawith, S. (2030). "Tri kazoj de infekta fragmentiga-kogna frenezo kaj ties implicoj por la supervivo de la homaro". *Psikiatria Revuo de la Mediteranea Medicina Universitato*, III(3), p. 110–123.

Davidoff, M. (2031). "Interkolonia kunordigo inter *Apis mellifera*, *Apis cerana* kaj *Apis florea* pere de instruita kodo bazita sur Esperantaj grafemoj". *Revuo de Agrikultura Inĝenierio kaj Aplikata Etologio*, 44(2), p. 88–119.

Capstan, R. (2033). "Grandaj lingvomodeloj konsentas nur en Esperanto: sistemaj intervjuoj kun dudek tri artefaritaj intelektoj". *Revuo de Sin-teza Psikologio*, 7(1), p. 12–57.

Borkum, R. (2035). "«Estu la Vorto», diris Dio: ontologia ekzisto de la lingvaj objektoj preter la parolantoj". Danio: Universitata Eldonejo La Pipfumanto.



La profilo de *Furiosa* kun bildo de la trajnakcidento ĉe la stacidomo Montparnasse en Parizo (1895).

Ne ekzistos nova mondo



DOSIER-KODO: CIT-Ø9/REG-FUR

KLASIFIKO: ANOMALIA REGISTRO / KAMP-ELTERGITAĴO

DEVENO: Prizorga Sektoro, Ĉasio de la Militformacio
(Batala Unuo 01).

REKOLTITA DE: Oficejo pri Loĝistiko kaj Datuma Anali-
zado de la Citadelo.

La jena dokumento reproduktas la laŭliteran transskribon de la sonregistraĵo trovita en la prizorga sektoro de la Militformacio. Temas pri la rekta atesto de Furiosa, kiun ŝi mem sekrete kaptis sur kaduka, malkvalita magnetofona bendo.

La registro estis registrita fojfoje kaj haste dum la horoj de maldormo en la dezerto, utiligante la sibladon de la senŝarĝe funkcia motoro por maski la eligon. La fonaj bruoj — la klakado de tordŝlosiloj, la elblovo de premaero kaj la frotado de keroseno — konfirmas, ke la registrado okazis paralele al la prizorgado de la pneŭmataj piŝtoj kaj la frikciaj juntoj de ŝia meĥanika protezo. La sonspektrogramo krome malkaŝas la mikropaŭzojn, kiujn ŝi faris dum la alĝustigado de la servomotoroj de la maldekstra brako.

Ĉi tiun dosieron retrovis la malkonstruaj taĉmentoj post la decida atako kontraŭ la provizvojoj. Ĝi estas konservata por strukturaj analizoj, cele al la kompreno de la psikologio de sabotado kaj la prevento de estontaj fiaskoj en la obekodo de la Imperatorranguloj.

La transskribo de la raporto estas prezentita ĉi-malsupre:

[EKO DE REPRODUKTADO - MAGNETOFONA BENDO #0153]

Ne serĉu belajn klarigojn en la rubmetalaĵo. En la Citadelo ekzistis neniuj spacoj por la vortoj, kiujn oni uzis, antaŭ ol ĉio iris feken; ekzistis nur la ciklo de la maŝino: krei transmision, bruligi benzinon, elvomi la fumon kaj engluti la silenton de la sklavoj, antaŭ ol la metalo postulis sian sangoracion. La mondo ne rompiĝis pro puno de la dioj. Ĝi malkonstruiĝis, ĉar la homoj volis pli ol tion, kion la tero povis doni. Ni iris al la diablo en konstanta elfluado de nafto kaj premosekigitaj putoj. La Dezertego ne estas la fino de la mondo. Ĝi estas mondo sen mensogoj. La nuda ĉasio de la ekzisto.

Oni rakontis al ni historiojn pri puraj urboj kaj turoj, kiuj tuŝis la ĉielon. La realo estas jena: malnova teĥniko, nula digno. Grundo el rusto kaj korpaj fluido, kie la homoj estas degraditaj al interŝanĝeblaj riparpecoj. En la Dezertego vi ne estas persono; vi estas komponanto de la roko, forĵetinda viando. Immortan Joe komprenis tion pli bone ol iu ajn: li konstruis sian fortikaĵon kaj enpemis nin en siajn dentradojn. La virinoj en la supraj ĉambroj estis sakoj por gardi la puran semon; la patrinoj de la tertaĝo, brutoj por mueli lakton; kaj la Militknaboj, homaj kugloj uzotaj kaj forĵetotaj. Ĉu Max? Ulo ligita al la nazo de aŭto, sangobaterio kun tubo pikita en la kolo por gardi maldorman mortantan ŝoforon. La potenco ne estas krono; ĝi estas havi monopolon pri la krano. La akvo en la Citadelo, la metano eltirita el la porkofeko en Komercurbo, aŭ la benzino en la cisterno de mia kamiono. Ne malamu la tiranojn. La tiranoj mortas. Malamu la bezonon, kiu devigas vin genuiĝi antaŭ ili, por ke ili lasu vin vivi ankoraŭ unu tagon.

La motoroj ne estas dioj. Ili estas muelitaj parazitoj el gisfero, kiuj nutriĝas per nia malespero. La Militknaboj ŝprucas sian buŝon per kroma farbo kaj krias al Valhalo, kiu odoras je brulinta pneŭmatiko kaj malvarma veldo. Ili kredas, ke eksplodi je cent sesdek kilometroj hore igos ilin eternaj. Kiaj idiotoj. Mi vidis tro multajn motorblokojn fendiĝi meze por scii, ke malantaŭ la fumo

troviĝas neniuj ĉielo; ekzistas nur malmultekostaj aloj kaj rompitaj bieloj. Motoroj savas neniun de la morto. Ili nur movas vin pli rapide. Sed kiam la moviĝo estas la sola variabla, kiu apartigas vin de la senhaŭtigado fare de la hordoj, kiuj travagas la asfaltan vojon, vi finfine preĝas al la bielo. La mistikismo estas la ruzo de tiuj, kiuj ne havas armilon ĉemane. Tial Max tiel bone adaptiĝis al la pejzaĝo. Li estis rabia besto kun la kapo rompita, fantomo, kiu trenis la spiritajn restaĵojn de siaj mortintoj, kvazaŭ temus pri fera ĉeno ligita al la maleolo, kiun li ne povis liberigi. Li ne venis por savi la estontecon de iu ajn. Li venis, ĉar la ĉenoj de la ĉasistoj lin trenis, kaj li restis, ĉar la dezerto jam ne havis pli da spaco por liaj demonoj. Du damnaj frenezuloj dividantaj la saman lamenmetalan loĝejon tra la salaj ebenaĵoj; tio estas la plej proksima afero al amikeco, kiun ĉi tiu loko proponas.

Dum tro longa tempo mi englutis la miton pri la Verda Loko. Mi kredis, ke, se mi pilotas la Militformacion sufiĉe malproksimen, se mi forkuras el la atingo de la lornoj de Joe, mi trovos sanktejon, kie la arboj kreskas el la tero, kaj la akvo ne gustas je sulfuro. Kia malsaĝulino! La Verda Loko, kiun mi memoris el mia infanaĝo, jam estis englutita de la acideco de la grundo kaj de la korvoj, longe antaŭ ol mi fariĝis Imperator. Ne ekzistas oazoj.

La dezerto ne estas libereco; ĝi estas la absoluta vakuo, kie ne ekzistas mastro, kiu vin gvatadas, ĉar restas nenio, kio valoras esti gvatata. La libereco ne estas forkuri laŭ la vojo, ĝis vi restos sen suko. La libereco estas sabotado. Estas la momento, kiam vi komprenas, ke la sola respondo kontraŭ la tirano ne estas kuri, sed eksplodigi liajn ĉenojn. Turni la stelon reen sur la roko ne estis ago de espero. Ĝi estis ago de kolerego. Se la mondo nepre estos sklavfabriko, mi preferas konduki la kamionon kontraŭ la dentojn de la majstro. Ni ne serĉis pli bonan morgaŭon; ni celis haltigi la hodiaŭan teruron. Perforta interrompo.

La Citadelo ne estas ĥaoso. Ĝia librotenado estas perfekta. La infanoj purigas la piŝtojn, ĉar iliaj manoj eniras en la cilindrojn;

la kripluloj gvas la manometrojn, ĉar ili ne bezonas la krurojn por rigardi montrilon. La teruro ne estas, ke mankas leĝoj; la teruro estas, ke la sistemo funkcias ekzakte tiel, kiel Joe volis. Ĝi estas matematika logiko de la transvivo, kie la kompato estas eraro, kiu igas vin elspezi pli da brulaĵo ol dece.

La sola afero, kiun ili ne povis enŝuti en la rafinejajn cisternojn, estas la obstino de la viando diri "ne", kiam ĉio ĉirkaŭ vi pelas vin diri "jes, Imperator". Tio ne estas damna politika revolucio; ĝi estas difekta peco en la maŝino. La lasta sparko de rompita specio, kiu preferas sin memdetruigi antaŭ ol esti perfekte prilaborita.

La Dezertego ne pardonas, ne punas kaj ne havas memoron. La sablodunoj viŝos niajn pneŭmatikospurojn, antaŭ ol la suno kaŝiĝos. Ne ekzistas nova mondo. La akvo, kiun ni liberigis el la cisternoj, kreas kotejon, kiun la dezerto englutos post kelkaj tagoj, kaj la naskistinoj finfine fariĝos la novaj laborestroj de la roko, ĉar la potenco malamas la vakuumon. Sed dum la motoro daŭre funkcias kaj mia metala mano tenas la rapidumstangon, la cirkvito ne estos fermita. Ne temas pri savi la homaron. Temas pri devigi la maŝinon rompi siajn proprajn dentojn kontraŭ ni ankoraŭ unu fojon. Ke ili estu atestantoj de la frapo.

Ludoviko de G.A.

* * *

Glosaro / Vortareto de la sagaterminoj

La Citadelo. Fortikaĵo kontrolata de Immortan Joe, kie koncentriĝas la akvo kaj la vegetaĵaro meze de La Dezertego. Ĝi estas la centro de potenco kaj la celo de la vojaĝo de Furiosa kaj ŝiaj aliancanoj por liberigi la rimedojn kaj la loĝantaron.

La Dezertego. Dezerteca kaj malamika teritorio, kie Furiosa batalas por transvivi kaj fuĝi de la tirano Immortan Joe. Ĝi estas la ruinigita mondo, kiu markas ŝiajn danĝerojn kaj ŝian ribelon.

Furiosa. Amazono ĉe la servo de Immortan Joe, kiu ribeliĝas por liberigi liajn edzinojn kaj forkuri al la Verda Loko. Dum la vojaĝo, ŝi fariĝas kuraĝa kaj protekta gvidantino, aliancante kun Max por kontraŭstari la tiranon kaj batali por libero.

Immortan Joe. Tirano, kiu regas La Citadelon kaj kontrolas la akvon kaj la rimedojn. Li konservas la potencon per la perforto, la kulto al sia persono kaj la kontrolo de la loĝantaro.

Imperator. Milita rango en la armeo de Immortan Joe; Furiosa havas ĉi tiun postenon antaŭ ol perfidi lin. Ĝi nomas altnivelajn komandantojn komisiitajn pri gravaj misioj.

Komercurbo. Urbo de komerco kaj transvivado en la postapokalipsa mondo, bazita sur la interŝanĝo de malabundaj rimedoj. Ĝi reprezentas kaosan, sed esencan centron interne de La Dezertego.

Militformacio. Forte kirasita milita kamiono uzata de Furiosa por transporti fuelon kaj fuĝi tra La Dezertego. Ĝi estas la klavoveturilo en ŝia ribelo kaj en la vojaĝo al la libereco.

Militknaboj. Fanatika armeo de Immortan Joe, formita de doktrinigitaj junuloj, kiuj vivas obseditaj de la ideo morti en batalo por atingi Valhalon. Ili estas la ĉefaj persekutantoj de Furiosa.

Naskistinoj. Junaj virinoj tenataj de Immortan Joe por naski sanajn infanojn kaj garantii lian devenlinion. Ili vivas kaptite en la Citadelo, kaj ilia fuĝo kun Furiosa ekigas la ĉefan konflikton de la rakonto.

Valhalo. Paradizo, al kiu la Militknaboj kredas, ke ili alvenos post heroo morto en batalo. Ĝi reprezentas ilian idealon de gloro kaj supera ofero.

Verda Loko. Legenda oazo memorata de Furiosa el ŝia infanaĝo, kiu simbolas esperon pri libera kaj prospera vivo for de la dezerto. Kiam ŝi atingas ĝin, ŝi malkovras, ke ankaŭ ĝi estis detruita de la postapokalipsa ruiniĝo.



La unua debato de la Gardistaro



La fetoro de Komercurbo ŝvebis en la aero: benzino, ŝvito kaj merdo. La homamaso silentis, kiam la maljunulo eniris lamante. Antaŭ la pordego de la Tondrokupolo li haltis kaj turnis sian senlumiĝintan vizaĝon al la atendantoj.

Neniu moviĝis. Eĉ la ratoj atendis.

"Mi estas la Gardanto de la Memoro de ĉiuj triboj."

Lia voĉo estis pli forta ol oni atendus de tiu korpo.

"Blinda kaj kovrita de vundoj pro ĉi tiu venena grundo, mi portas al vi hodiaŭ bonajn novaĵojn. Aŭskultu, Kongregacio, kaj konservu en viaj koroj la memoron pri la unua disputo de la Gardistaro de la Fundamento.

Perfekta estas la Fundamento! Netuŝebla por la eterneco!"

La homamaso ripetis la vortojn trifoje, tondre.

"Ni ne scias, kial la antikva mondo krake disfalis."

Li haltis, eksuferis tusatakon kaj kraĉis teren sangan salivaĵon.

"Venis la jaroj de polvo. Ni satiĝis je sango ĝis naŭzo, ĝis preskaŭa malapero. Sed antaŭ la fina falo revekiĝis la Interna Ideo, kiu kuŝas en ĉiu homa koro. Ni komencis resaniĝi. Ni komencis interkonsenti."

Murmuro iris tra la Kongregacio.

"Ni sopiras al la Orepoko, kiam oni povis iri al loko nomata superbazaro, plena de manĝaĵoj, sen riski sian vivon. Travidebla akvo. Senverma viando. Eĉ fruktoj. Brando, kiu ne blindigis onin."

Ridoj. Malkredemaj murmuroj.

La maljunulo sulkis la lipojn, kvazaŭ ofendita.

"Jes, kelkaj diras, ke ankaŭ tiam ekzistis malsato kaj subpremo. Eble. Sed en tiu glora tempo, se iu feŭdo deflankiĝis de la nobla vojo, la granda *Societo de Unuiĝintaj Feŭdoj* tuj vokis la kulpulojn, esprimis kortuŝan maltrankvilon kaj petis ilin reveni al justeco.

Mi mem legis stakojn da tiaj dokumentoj, kiam ankoraŭ brilis lumo en miaj okuloj. Problemoj ekzistis, sed ili ĉiam estis diligente solvitaj per deklaroj, rezolucioj kaj aliaj sanktaj paperoj."

Kvazaŭ li estus forviŝinta la dubojn, la maljunulo daŭrigis:

"Post la jaroj de polvo revenis la intertribaj leĝoj: la leĝoj de la Cindrotero. Tiuj leĝoj montris, ke oni povas intertrakti sen eks-termini unu la alian; ke per nura manpleneto da mortintoj oni povas atingi kontentigan solvon.

Kaj kun la ordo revenis la paco. Kaj kun la paco revenis la kulturo. Kaj neeviteble revenis la disputoj pri vortoj. Ĉar vortoj estas iloj de vivo kaj morto.

En ĉi tiu radioaktiva dezerto ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj kapblas legi kaj skribi. El la dek sep triboj ili kuniĝis kaj fondis la Gardistaron de la Fundamento."

"Jam forpasis la tempo de enuigaj, harfendaj debatoj", diris la maljunulo, kaj lia voĉo iĝis pli malvarma. "Ni lernis, ke senutila parolado ne finas la dubojn, sed multobligas ilin. Pro tio, nun ĉio komenciĝas kaj finiĝas en la Tondrokupolo de la Lingvo."

Li levis du fingrojn.

"Du Gardistoj eniras."

Li mallevis unu.

"Unu Gardisto eliras."

"Tia estas la regulo."

Neniu grimacis. Aŭ almenaŭ neniu grimacis videble.

"Kaj tiel alvenis la inaŭgura disputo. La sankta demando estas jena: ĉu la tiel nomata Universala Vortaro devas ricevi novajn klarigojn por la nuna epoko kaj esti rekonata kiel la Nova Gardistara Vortaro?"

De sur sia malseka pergameno li eklegis malrapide, kun la peza soleneco de kredo.

Proponoj por la Nova Gardistara Vortaro

Malsanulejo. Agoniulejo; loko, kien oni portas mortontojn, por ke ili ne ĝenu la batalantojn, la infanojn aŭ la provizokalkulistojn.

Demokratio. Rajto de la venkintoj regi nome de ĉiuj. Ordinare venkas la plej granda grupo, sed koalicioj aŭ embuskoj povas korekti la nombradon.

Sano. Stato de homo, kiu ne ŝajnas baldaŭ mortonta pro febro, vundoj, malsato aŭ perfido al la Fundamento.

Paco. Efemera interbatala tempo, dum kiu oni sukcesas konvinki la alian flankon, ke atako estus malpli profitdona.

Kaj jen la novaj vortoj, necesaj por ordigi la tribojn:

Langotranĉito. Senlangulo; kondamnito, kiu atencis kontraŭ la Fundamento, sed ne ĝis la nivelo de herezo.

Fingrotranĉito. Langotranĉito, kiu ankaŭ scipovis skribi.

Fundamentofidelulo. Homo, kiu konservas la ĝustan vojon kaj aktive akuzas ĉiujn deflankiĝantojn.

Regulrompanto. Herezulo, kiu proponis reformon aŭ provis enkonduki ekstertribajn vortojn. Ankaŭ individuo, kiu ligas skribilon al la stumpo de fingrotranĉito. Regulrompanton la Kongregacio devas tuj neniigi.

La maljunulo mallevis la pergamenon.

"La sep triboj de la nordo postulas akcepton. La dek triboj de la sudo postulas malakcepton. Laŭ la reglamento, ĉiu flanko rajtas prezenti unu ĉampionon."

Je tiuj vortoj, du flankaj pordoj malfermiĝis kun metala ĝemo.

El la dekstra pordo elpaŝis la ĉampiono de la nordo, defendanto de la Akcepto. Li estis larĝa kiel pordego, vestita per kirasoj el trafikŝildoj, rompitaĵoj kaseroloj kaj platoj de forgesitaj maŝinoj, sub kiuj elpendis lia ventregoj. Sur lia brusto pendis rusta kuglujo, sur kiu estis ĉizita unu sola vorto:

JES.

El la maldekstra pordo elpaŝis la ĉampiono de la sudo, defendanto de la Malakcepto. Pli alta, pli maldika, kun muskoloj streĉitaj kvazaŭ dratoj sub la haŭto. Ĉirkaŭ lia kolo pendis koliero el sekaj oreloj de herezuloj. Sur lia frunto, skribita per cindro:

NE.

Inter ili, la velkiĝinta Gardanto de la Memoro subite aspektis kiel komo inter du majuskloj.

La maljunulo levis tremantan manon.

"Jen, Kongregacio, la disputo de la Gardistaro de la Fundamento. Ĝi ricevos rapidan solvon, kaj ĉio restos registrita en la unua akto de la Gardistaro."

La du argumentistoj eniris en la Tondrokupolon de la Lingvo. La pordego fermiĝis post ili kun sono de fina interpunkcia signo.

Nur unu el ili eliros, kaj tiel la lingvistika problemoj estos solvita.

TE

Gravita kerno



En la aero ŝvebasodoro je ozono, lasta spuro de la K-radioj, kiuj eksplodigas karnon sed respektas varojn. Petro spasme turnas la kapon kaj vidas sian dekstran brakon kelkajn metrojn for sur la pavimo. La mano ankoraŭ krampe tenas la libron. Sub la akra sunlumo la sango petrole nigras. La ŝoko ankoraŭ baras la doloron.

Super li, momente eklipsante la sunon, elĉieliĝas AlfaAnĝelo kvazaŭ plasta vulturo. Ĝi verŝas sian kuracigan benon sur lian dispecigitan korpon. Petro fiksrigardas la orkoloran emblemon sur ĝia blanka ventro. Tuj alvenas la doloro, portante nigran silenton.

Li rekonsciiĝas en vasta betona ĉambro. Meze staras longa metala tablo. Ĉe unu flanko sidas Petro, homa ruino katenita al vivsubtena aparato, kiu puŝas tubojn kaj kablojn en lian karnon. Ĉe la alia flanko sidas danĝere maldika viro en nigra vesto. Apud li staras roboto kun longaj, brilaj antenoj, kiu klinas la kapon iom flanken per insekteca gesto.

— Sinjoro Petro Samsa, vi estas sub enketo.

La vortoj atingas lin tra drognebullo. Li pene levas sian ŝvelintan vizaĝon al la voĉo.

— Ĉu vi konfesas?

Petro glutadas, sentante en la buŝo plastan guston pro la tubo trudita en lian naztruon.

— Mi... prenis libron... Kie estas la flegistino?

La viro ridetas sen ĝojo.

— Vi ne estas en hospitalo, sinjoro Samsa. Aŭskultu. Mi ne demandas, kion vi faris. Mi demandas, kial.

Petro palpebrumas. Ruĝeta salivo likas ĉe liaj lipoj kaj gutas sur la metalon.

— Mi ŝatas ilin... la tekstojn... la librojn. Mi eĉ havas plurajn presitaĵojn en mia loĝĉelo. Sed mi ne certas... ĉu... — li momente silentas por repreni spiron. — Mi volis scii, ĉu ĝi estas vera.

— Ĉu vera?

— La vera libro. Ne kopio de skanaĵo. Ne algoritme rekonstruita bitbildo. Vera papero. Vera inko. La premsignoj de meta-laj literoj en la papero. Se ĝi estas vera... — li pene levas la okulojn al la enketisto — ...tiam eble ankaŭ vera estas tio, kion ĝi diras. Ke la lingvo apartenas al ĉiuj. Al neniu korporacio.

La kadavreca viro rigardas Petron kvazaŭ ekzamenante pajloŝtopitan dodon. La roboto ne moviĝas. Nur ĝiaj antenoj unufoje tremetas, kaj la tri okuloj zumante reĝustigas siajn fokusojn.

— Plurjarcenta miksaĵo de celulozo kaj inko — li diras fine, kvazaŭ al si mem. — Tiajn objektojn oni ne plu fabrikas. Oni presas luksajn librojn por kapricemuloj, sed ne plu per monstraj mekanikaj presmaŝinoj.

Li kunmetas la manojn antaŭ si.

— Tiaj nefalseblaj objektoj antaŭlonge fariĝis nura rubaĵo.

Petro murmuris:

— Mi volis teni ĝin. Tuŝi la premspurojn de la literoj. Flari la dolĉetan odoron...

— Certe, celulozo malkomponiĝas kun la tempo, kaj tiel estiĝas tiuodoro... — la viro abrupte haltas. — Sed ĉu vi vere ne scias, kial ĝuste la plej malnovaj esperantaj libroj fariĝis tiel valoraj? Aŭ ĉu vi opinias min stulta?

Petro, konfuzita, ne respondas. La roboto klinetas sin; ĝiaj tri okuloj fiksiĝas sur lin.

— Antaŭ ol formorti, la naciaj bibliotekoj iom post iom translokigis ĉion al servilaroj: tekstojn senĉese ĝisdatigatajn, bildojn purigatajn, historion korektatan. Tamen preskaŭ nerimarkite, la esperantistoj konservis librojn en hejmaj biblioteketoj sur ĉiuj kontinentoj. Miloj da paperaj ekzempleroj. Sinjoro Samsa... ĉiu

ekonomia sistemo bezonas ion neŝanĝeblan. Sufiĉe komunan por garantii stabilecon. Sufiĉe malabundan por garantii valoron. Akceptatan de ĉiuj korporacioj, sendepende de ilia devenlando. Antikvaj esperantaj libroj ja estis perfektaj por nia celo.

Petro fermetas la pezajn okulojn.

— Kaj tial ili nun valoras pli ol oro...

La enketisto ne ridetas.

— Ne. — La viro malrapide balancas la kapon. — Oro estas por la popolo. Inter korporacioj, inter tiuj, kiuj interŝanĝas urbojn, akvorezervojn, ŝuldojn, homamasojn... ili ne plu transdonas metalon. Ili transdonas fidon fiksitan en objektoj. Kaj nenio inspiras pli da fido ol tio, kion neniu plu povas vere rekrei.

Petro malsekigas siajn lipojn.

— Sed mi facile eniris la bibliotekon.

— La afero ne estas eniri, sed eliri. La plej efika maniero gardi valutan rezervon ne estas ŝlosi ĝin malantaŭ muroj. Ĝi estas certigi, ke preskaŭ neniu sciu, ke temas pri trezoro. La popolo vidas



malnovajn salonojn, polvajn vitrinojn, enuigajn restaĵojn. Nur la elektitaj homoj scias, ke tio estas rezervo.

— Mi volis nur... — Petro haltas. — Mi volis tuŝi la veran Fundamenton.

Ĉi-foje la silento daŭras longe.

La enketisto rigardas flosantan ekranon, kiun projekcias la roboto. Li rikanas.

— Vi ne apartenas al terorisma grupo. Vi ne estas sabotisto. Nek kontrabandisto. La neŭrosondiloj de mia roboto tion jam konfirmis.

Petro ne scias, ĉu tio estas senkulpigo aŭ kondamno.

— Vi estas nur romantikulo — daŭrigas la viro, sen kaŝi la malestiman tonon.

Li leviĝas malrapide kaj aliras la vivsubtenan aparaton de Petro. De proksime lia vizaĝo ŝajnas seka kaj tro streĉita, kva-zaŭ la haŭto estus etendita rekte sur la kranion. Subite la tuta ĉambro fariĝas terure klara: la betono, la vitro, la kabloj en la brusto de Petro, la blankaj fingroj de la viro super la maŝino, kiu ronronas mole, preskaŭ ame. El la seka viro kaj lia silenta, observema lakeo radias malvarmo.

Li metas manon sur la ŝultron de Petro. Ne severe. Preskaŭ milde.

— Vi ne estas danĝera pro tio, ke vi prenis la libron.

Petro pene levas la okulojn.

— Kial do...?

— Pro tio, ke vi malkovris nian sekreton. En la registroj vi aperos kiel ordinara ŝtelisto, kiun mortigis la gardosistemo.

Poste aŭdiĝas unu sola klako. La ronronado ĉesas. En la subita silento Petro revidas la irizajn literojn sur la malnova kovrilo:

Fundamento de Esperanto. Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro. Hachette. Paris. 1905.

La Arbo de la Mondofino



La homaro ĉiam ŝatis klasifiki. Estas nia maniero konkeri la mondon. Se ni povas nomi ion, ni elspiras trankvile. Same kiel malsanulo, kiam la kuracisto fine donas nomon al onia malsano: eĉ se ĝi estas nekuracebla, la kondamnito almenaŭ povas nomi sian buĉiston. Kia trankviligo!

Eĉ demonoj multe zorgas ne malkaŝi siajn nomojn. Ĉiuj scias, ke, kiam oni konas la nomon de demono, oni jam povas ekzorci ĝin. La nomo donas al ni la iluzion de potenco. Same ni faris kun la apokalipsoj. La rezulto ne estas kompleta. Ĝi eĉ ne sekvas la bonajn regulojn de scienca klasifikado; ĝi pli similas al mezepoka bestaro. Sed tio ne gravas. Ĝi utilas por enmeti la realon en nian fantastan vortan mondon.

En la lasta paĝo de la fanzino vi trovos falditan A3-formatan mapon. Ni ankaŭ volis fari ion tuŝeblan. Se vi legas ĉi tion bite, kredu nin: la sento ne estas la sama. Malfaldu ĝin kaj rigardu la arbon, kiun ni plantis.

Ĝi kreskis laŭ ses ĉefaj branĉoj: milita, biologia, socia, ekologia, teknologia kaj kosma. Sur ili pendas entute dudek tri fruktoj, ĉiuj venenaj laŭ propra maniero. Kelkaj estas malnovaj konatoj. Nuklea milito, pandemio aŭ asteroido jam havas sian lokon en la kolektiva imago. Ili estas la lupoj, drakoj kaj baziliskoj de nia moderna bestaro.

Aliaj estas pli novaj estaĵoj. Artefarita intelekto povas ekstermi nin, sed ankaŭ pli simple anstataŭi nin. De ĉiam oni trankviligas sin per la penso pri vivo post la morto, pro timo de neniigo. Sed ĉu ĉia vivo estas vere preferinda al natura fino? Ni povas bitygi niajn mensojn kaj lasi la karnon malantaŭe, aŭ malkovri tro

malfrue, ke la tuta universo estis nur simulaĵo kaj ke iu ekstere jam serĉas la malŝaltilon. Eĉ senmorteco trovis lokon en la arbo: ne kiel savo, sed kiel senfina stagnado, mondo, kie neniu mortas kaj nenio plu okazas.

Kaj, kompreneble, ni ne bezonas eksteran monstron. La homaro estas tre kompetenta pri katastrofoj. Ni povas veneni la medion, ĉesi reproduktiĝi, detrui unu la alian aŭ simple perdi la emon daŭrigi la aferon. Tamen la plej humiligaj finoj venas el la ĉielo. Asteroido, gama-radia eksplodo, vaganta planedo... aŭ supercivilizo, kiu detruas nin tute senintence. Ne pro malamo. Ne pro milito. Eble ili simple konstruas ion kaj nia sunsistemo ĝenas la laboron. Formikoj ankaŭ ne ricevas militdeklaron antaŭ ol ni pavimas vojon.


Jen do nia arbo. Elektu branĉon, sekvu ĝin per la fingro kaj trovu vian preferatan finon. Se via plej ŝatata apokalipso mankas, ne zorgu. La homa imago laboras senĉese, kaj la realo havas malagrablan kutimon superi ĝin.

TE

Ni retroviĝos en
la sekva numero
de KOMETO.

Kompreneble, se
la apokalipso ne
venos antaŭe!







KOMETO, revenanta stelo, kiu anoncas vivon kaj morton. Alvoko al la imago aŭ monduma distraĵo. KOMETO celas uzi sciencfikcion kaj fantaston por esplori eblajn mondojn per rakontoj, artikoloj kaj recenzoj. KOMETO estas preteksto por paroli pri niaj revoj kaj timoj, kiuj speguliĝas en strangaj fabeloj.